

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 1

Januaro/Februaro 1967



Fulda antaŭ ni!

19a Internacia Fervoja Esperanto-Kongreso

Ĉion sciindan pri la kongreso mem, pri programo, aliĝo, prezoj ktp, vi povas legi en „La Internacia Fervoja Esperanto“. Krome la lokaj kaj distrikta gvidantoj volonte informos vin. Se vi ankoraŭ bezonas aliĝilon, vi povas peti ĝin de la adreso: „19a IFEF-kongreso, 6 Frankfurt (Main) 70, poŝtako 700746“ aŭ en la GEFA-sekretariejo, Bundesbahn-Sozialamt, 6 Frankfurt (M), Karlstr. 4-6 (Telefona 5615).

Ĉi tie ni nur ankoraŭfoje deziras atentigi nian germanan membraron pri tiu unika okazo, partopreni en internacia kongreso sub la plej facilaj kondiĉoj penseblaj. Kaj ne nur tio, sed vi havas favoran eblecon, kunesti kun viaj konatoj, ja vi eĉ povas helpi multloke, pagante por viaj orientlandaj amikoj kongreskotizon kaj certan sumon. Tiel vi povus ebligi la ĉeston al multaj eksterlandaj kolegoj malgraŭ ties financaj malfacilaĵoj.

Tio estus precipe rekomendinda por tiuj, kiuj havas amikojn en Bulgario kaj mem intencos viziti la 20-an kongreson en Sofio.

En ĉi tiu „Bulteno“ vi trovas adiaŭajn vortojn por longjara estrarano de GEFA. Li tamen daŭrigas sian kunlaboron en LKK, kies ano li ankaŭ estas, kune kun sep aliaj helpemuloj. La taskoj por LKK estas des pli komplikaj, ĉar nur du LKK-anoj loĝas en la kongresurbo Fulda, dum la aliaj ĝis pli ol 200 km for de ĝi. La sekvo estas, ke amaso da leteroj devas esti skribataj, kio kompreneble postulas multe pli da tempo ol se buŝa aranĝo eblus. Sed la preparado de la kongreso tamen kontentige progresas.

Vi povas esti certaj, ke LKK faris kaj faros sian eblan por „liveri“ al vi allogan kongreson, kiu digne vicigos al la riĉa tradicio de la pasintaj 18 IFEF-kongresoj.

Bonvolu, estimataj germanaj gekolegoj kaj geamikoj, rekomenci la anojn de LKK por ilia dujara penado vizitante multnombre la 19an kongreson.

Honoru niajn karajn gastojn per via ĉesto en Fulda.

Prezidanto

Fulda liegt vor uns!

19. Internacinaler Eisenbahner Esperanto-Kongreß

In dieser Nummer des „Bulteno“ finden Sie Abschiedsworte für ein langjähriges Vorstandsmitglied von GEFA. Dieser Kollege ist jedoch mit 7 anderen Mitarbeitern weiterhin im Kongreßausschuß tätig, dem er ebenfalls angehört. Die Aufgaben für diesen Ausschuß sind um so schwieriger, als nur zwei Ausschußmitglieder in der Kongreßstadt Fulda wohnen, die übrigen dagegen bis über 200 km entfernt. Infolgedessen müssen eine Menge Briefe geschrieben werden, was natürlich weit mehr Zeit erfordert, als wenn alles mündlich vereinbart werden könnte. Trotzdem macht die Kongreßvorbereitung gute Fortschritte.

Alles Wissenswertes über den Kongreß selbst, über Programm, Anmeldung, Preise usw. können Sie in „La Internacia Fervojisto“ lesen. Die ört-

lichen Gruppenleiter und die Bezirksbeauftragten geben Ihnen ebenfalls gern Auskunft. Falls Sie noch Anmeldevordrucke brauchen, wollen Sie diese bitte bei der Kongreßanschrift „19a IFEF-kongreso, 6 Frankfurt (M) 70, Postfach 700746“ oder im GEFA-Sekretariat, Bundesbahn-Sozialamt Frankfurt/M, Karlstr. 4—6 (Telefon 56 15) anfordern.

Wir möchten hier nicht versäumen, unsere deutschen Mitglieder und Freunde nochmals auf diese einzigartige Gelegenheit aufmerksam zu machen, unter den denkbar einfachsten Bedingungen an einem internationalen Kongreß teilzunehmen. Und nicht nur das, Sie haben auch eine günstige Möglichkeit, mit Ihren Bekannten zusammenzusein, ja Sie können sogar verschiedentlich helfen, indem Sie für Ihre östlichen Freunde den Kongreßbeitrag und eine gewisse Summe zahlen. Auf diese Weise können Sie manchem ausländischen Kollegen trotz seiner Devisenschwierigkeiten das Dabeisein ermöglichen. Besonders empfehlenswert ist das für diejenigen, die in Bulgarien Freunde haben und selbst beabsichtigen, den 20. Kongreß in Sofia zu besuchen.

Sie können gewiß sein, daß der Kongreßausschuß sein Möglichstes tat und tun wird, um Ihnen einen ansprechenden Kongreß zu „liefern“, der sich der reichen Tradition der vergangenen 18 IFEF-Kongresse würdig erweist. Lohnen Sie den Angehörigen des Kongreßausschusses ihre 2-jährige Mühe, verehrte deutsche Kollegen und Freunde, indem Sie zahlreich den 19. Kongreß besuchen. Erweisen Sie unseren Gästen Ehre, indem Sie nach Fulda kommen.

Grava ŝanĝo inter la GEFA-gvidantoj

Ekzakte 10 jarojn la GEFA-estraro restis sen io ŝanĝo. Tio ŝandube estas longa tempo kaj nur malofte okazas tia „miraklo“. Nu, ĝi tamen okazis. Kaj hodiaŭ estas mia iom senĝoja devo konatigi al la membraro, al niaj kunlaborantoj en Germanio kaj aliaj geamikoj, ke unu el la tri estraranoj laŭ propra deziro ekŝiĝis: nia kolego, kunlaborinto kaj amiko Wilhelm Barnickel. Kiam mi la unuajn fojojn kunestis kun li en la 5a IFEF-kongreso kaj en feria semajno en Skotlando, mi ne antaŭvidis, ke pli poste ni fariĝos kunlaborantoj dum longaj dek jaroj.

Kiam pro diversaj kaŭzoj de 1954 ĝis 1956 kvazaŭ la tuta laborado por GEFA kuŝis sur mi, kolego Barnickel jam helpis sendante kontribuojn por „Bulteno“. Kaj kiam en aŭtuno 1956 li estis petita fariĝi membro en la estraro, li ne longe pripensis, sed kapjesis kaj kunagis. En Bulteno n-ro 1/57 mi skribis sub la titolo „Kaj nun?“



Barnickel



Graß

la
iama kaj ĝisnuna
redaktoroj

jenajn vortojn: „Ni esperas kaj volas, ke ĉi-kaze la nova balailo (nova GEFA-estraro) ne nur komence funkcios.“ Ke tiuj vortoj plenumiĝis grandparte estis merito ankaŭ de kolego Barnickel.

De komenco li havis la specialan taskon „varbado“. Kun elano li atakis ĉiam denove la kompetentajn instancojn de DB kaj fakte atingis, ke ili plurfoje tradukigis kaj eldonis la DB-faldprospektojn ankaŭ en Esperanto. Dum la Universala Kongreso en Mainz li kunhelpis en la seskapa teamo, kiun disponigis DB al la kongreso. Venis la sennombraj okazoj, kiam li per siaj ideoj fruktigis la laboradon en la tiama faka konsilantaro ĉe BSW-ĉefestraro, la nuna laborkomisiono ĉe BSW-ĉefestraro.

Ofte li surprizis nin per grafikaj skizoj kaj kreis afiŝojn kaj glumarkojn. Ankaŭ emblemon, glumarkon kaj insignon por la 19a kongreso li elpensis, desegnis kaj prizorgis.

Aldone al ĉio tio li bonvole transprenis komence de 1962 la redaktadon de „Bulteno“, post kiam jam en la antaŭaj jaroj ofte aperis en ĝi artikoloj aŭ tradukaĵoj signitaj per la literoj WB. Plenajn 5 jarojn li redaktis nian organon kaj daŭre zorgis, ke ties enhavo restis sur sufiĉe alta nivelo.

Venis nun la tempo, kiam li decidis adiaŭ de ĉi tiu laboro, kiu kvazaŭ fariĝis parto de lia vivlaboro, por fariĝi pli libera por aliaj aferoj. Ni liaj longjaraj intimaj kunlaborintoj dankas lin, ankaŭ nome de la membraro, kaj esperas ke iam kaj tiam li sentos sin retirata al neforgesebla komuna tasko. Sendube li estos ĉiam bonvena.

La BSW-ĉefestraro komisiis min, ĉi-loke esprimi lian profundan, sinceran dankon al s-ro Barnickel pro ties 10-jara senriproĉa agado por BSW.

Germanaj proverboj diras: „Kio por unu estas strigo, por alia estas najtingalo „kaj“ ĉiu komenco estas malfacila“. Ambaŭ validas ĉi-kaze. Favora sorto donacis al GEFA kolegon, kiu estis tiom bonvola, fariĝi posteulo en tiu ofico. Jen la nova redaktoro:

s-ro Willi Grass el Solingen. Li same agados ankaŭ en la laborkomisiono ĉe la BSW-ĉefestraro, tiel ke la poresperanta laboro ne interrompiĝos. Ni kore bonvenigas kolegon Grass, kiu jam bone estas konata en nia asocia rondo kiel distriktkomisiito de Wuppertal, kiu i. a. organizis la jarkunvenon en Solingen. De jaroj modele li gvidas sian distrikton kaj faris el ĝi unu el la plej viglaj en Germanio.

Same kiel antaŭ dek jaroj la nova estraro, nun konsistanta el la gekolegoj Giessner, Kruse kaj Grass, neniel kaj nenion promesas. Sed vi, la membraro, povas esti certa, ke ni daŭrigos doni ĉiujn niajn fortojn por tio, kion ni ekkonis grava por la homaro kaj por nia vivo: la nobla ideo de d-ro Zamenhof. Kaj same kiel antaŭ dek jaroj ni memorigas vin, ke tri personoj solaj nenion povas fari sen la helpo de ĉiuj. Facile vi povas helpi fortigi nian asocion, alvenigi novajn adeptojn, aktivigi en la lokaj societoj, korespondi, daŭre uzi la lingvon kaj fariĝi pli kaj pli konvinkitaj esperantistoj.

Giessner
Prezidanto

Novaj pri la internacia fervojtrafiko

Nederlandaj Fervojoj (NS) deziras ŝtatan subvencion.

Ankaŭ la laŭleĝa formo de kompanio anonima kaj la praktike uzata, libera konkurzo, montris sin sentaŭga, por haltigi la financon deficiton. Laŭ la opinio de NS-ĝeneralsekretario Leopold jam ne plu estas eble plialtigi la profiton pere de malfunkciigo de fervojaj linioj kaj stacioj. Pro daŭraj neegalaj konkurkondiĉoj, pro la ĉiamaj plialtigitaj kostoj por la servistaro kaj por kreskantaj elspezoj rilate al sekurigo, NS-ekonomio tiom grave malfortiĝis, ke la fervojo povas efektivi la necesajn investaĵojn nur kun ŝtata helpo.

Frajtjarkrafiko en Okcidenteŭropo

En la okcidenteŭropaj ŝtatoj Belgio, Germana Federacia Respubliko, Francio, Britio, Italio, Nederlando, Svisio kaj Hispanio dum la lastaj ses jaroj perdis la fervojoj multe da ekspedovolumaroj. Kompare al tio grandigi la ŝarĝaŭtomobila trafiko en ĉiuj tiuj ŝtatoj, precipe en Hispanio kaj Svisio. La riversipaj kompanioj en Francio kaj GFR restis konstantaj, dum en Neder-

lando ili povis plialtigi siajn kontingentojn de 39,8% en 1957 je 45% en la jaro 1962. Tio rezultis el komparanta prezento de evoludirektoj de transportpartigoj en okcidenta Eŭropo.

SNCF atendas kreskon de la frajtjarkrafiko

La francaj ŝtataj fervojoj atendas en ĉi tiu jaro pli grandan nombron de vagon-karĝoj en la frajtjarkrafiko, post kiam en aŭtuno 1965 esence ĝi restis sub la antaŭtaksoj. Sendube regresis la transportitaj kvantoj de karbo pro konjunkturaj kaj strukturaj influoj. Kvankam SNCF ek de la 1. 3. 1966 plialtigis la tarifojn, la transportkostoj devos esti altigitaj post nelonge.

Norvegaj Ŝtatafervojoj en 1965

La frajtreformo nur parte sukcesis. La ekonomia rezulto de la NSB estas influita precipe de la frajtkalkulado en la frajtjarkrafiko. La vagon-karĝtrafiko laŭtende sukcesis. Tio signifas, ke la transportita kvanto kompare al 1964 kreskis je 9%. Samtempe plialtigis la mezkvanta ŝarĝo de frajtjarkarĝoj de 14,7 t en 1964 al 17,04 t. La

pecajtrafiko kontraŭe laŭ kvanto estis pli mal-ampleksa ol en 1964 (-13,1%). Krome regresis la mezgrada plenkargo.

„La novaj vartarifoj“ estis objekto de la fakprelego dum la 17a IFEF-kongreso en Hamar (Norvegio).

Der schwerste Güterzug Europas

Insgesamt 3600 Tonnen schwer und 700 Meter lang.

Der schwerste Güterzug Europas rollt seit dem 3. November 1966 an jedem Werktag aus der Grube Warndt bei Saarbrücken nach Vernou sur Seine bei Paris. In 90 Spezialgüterwagen transportiert der Zug rund 2500 Tonnen Kohle. Damit erreicht seine Nutzlast etwa das Doppelte eines normalen Güterzuges. Er benötigt 2 Lokomotiven, die auch in Steigungen für die Einhaltung der im Fahrplan vorgesehenen Zeiten erforderlich sind.


Dampflokomotive mit Innenleben

Im Verkehrshaus der Schweiz in Luzern bietet sich täglich Gelegenheit, eine Dampflokomotive bei der Arbeit zu sehen. Dort steht die 60 Jahre alte Brüning-Lokomotive HG 3/3 1063 und zeigt dem Besucher ihr Innenleben in aller Offenheit. Wasser, Heizgase und Dampfwege sind farbig dargestellt, und ein Elektromotor setzt die ganze Maschinerie in Bewegung. (Aus „Rad und Schiene“ Nr. 12/1966)

DB. Das rollende Material der DB repräsentiert zur Zeit einen Neuwert von 16,3 Milliarden DM, das sind 33% des Wertes der gesamten Eisenbahnanlagen — Die Bundesbahn Nr. 22/1966 —

Die Serien „Old Look“ und „Die schöne Dampflokomotive“ sind zu je DM 2,80 durch den Redactor Verlag, 6 Frankfurt/Main 50, Po Ffm 236500, zu beziehen.

Giganta projekto de la eŭropaj fervojaj-administracioj



Ekspertoj esperas: Aŭtomata kuplilo ĝis 1975

Tiel aspektas la eŭropa fervojkoplilo en estontece. La fakuloj esperas realigi la aŭtomatan kuplilon en ĉirkaŭ dek jaroj. Tiam ne ekzistos la konvenciaj bufroj, ĉar la aŭtomata kuplilo povos

preni sur sin bufratrakciajn forojn. Ĝi kunigos la pneŭmatikan bremson kaj la elektrikajn kondukilojn.

(El „Rad und Schiene“ n-ro 9/1966)

El la grupoj

Dortmund. Okaze de la naskiĝtago de dr-o Zamenhof la grupo aranĝis modestan feston la 12an de decembro en la ornamita salono de la eksterlanda instituto. Antaŭ 30 aŭskultantoj okazis post legado de la libro „Vivo de Zamenhof“ plumprezentado pri vojaĝo al Varna-Plovdiv (Bulgario) kun diversflankaj kontaktoj. — Ĉiun lundon estas grupvespero de la 18a ĝis la 20a horo, kie gastoj ĉiam estas bonvenaj.

Essen. La membroj de la distrikto renkontiĝis la 12an de decembro en la fervoja restoracio de la ĉefstacidomo. S-ano Bartz parolis pri la jarkunveno en Uelzen. Ĉeftemo estis la preparoj por la IFEF-kongreso en Fulda. En februaro aŭ marto s-ano Schnetzer prelegos pri sia vojaĝo al Afriko kaj montras lumbildojn.

Köln. La Esperanto-unuigo Grand-Kolonjo festis la tradician Zamenhof-kaj Kristnasko-feston la 18an de decembro en salonego de la restoracio Stadtgarten, kie kunvenis gemanideanoj el Köln kaj gastoj el Nordrejn-Vestfalio, inter ili multaj fervojistoj. — La ĉefkunveno okazas la 22an de februaro en la klubejo Venloer Wall 15.

Anoncoj

Moderne Menschen sprechen Esperanto kaj Esperanto, die internationale Sprache estas mendebila ĉe: Centra Oficejo de GEA, 85 Nürnberg 2, Postfach 2113.

IOE-Gazeto. Organo de Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto. Ĉefredaktoro: Tibor Sekelj, Pop Lukina 1, Beograd, Jugoslavio. Abonprezo 8,50 GM.

La Teksumisto. Internacia revuo por ĉiuj branĉoj de la teksuma fako. Redakcio kaj administracio: Manfred Führer, CH 4900 Langenthal. Abonprezo 4,70 GM

Skövde, centro de Skaraborg. Multkolora faldfolio pri la sveda urbo Skövde. Senpage ricevebla ĉe Fritidsstryrelsen, Skövde, Svedujo.

Haute-Saône. Multkolora faldfolio en Esperanto pri la franca departemento. Senpage ricevebla ĉe Syndicat d'Initiative, F 70 Gray, Francujo.

Esperanto en Komerco. Kvinlingva raportaro pri spertoj de 100 firmoj el 40 landoj. Prezo 2.— GM. Esperanto-Rondo, 718 Crailsheim.

Nova Esperanto-disko. Eldonis Jugoslavio Esperanto-Ligo kaj Radio-Televideo Beograd, Jugoslavio. Prezo 1 us. dol.

Universala Esperanta Stenografio (unesteno) de Sturzenegger/Matzinger. Detala lernolibro por instrui sin mem. 294 paĝoj, formato A 5, Eldonejo Mondo: Rothstraße 7, CH 8057 Zürich 6. Prezo: \$ 4,90 aŭ egalvalore. La libro aperis sub la aŭspicioj de UEA kaj de Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI), surbaze de plurjardecaj spertoj en diversaj stenografisistemoj kaj post plurjara esplora laboro kaj elprovado.

Lichtenfels. Post longa varbado inter la fervojistoj kaj post aperigo de kelkaj artikoloj pri Esperanto en la loka gazetaro s-ano Müller en Lichtenfels sukcesis gajni ok fervojistojn kaj ok aliajn personojn por nova Esperantokurso. La stacidomo afable disponigis instruadĉambron en la stacidomo. La gelernantoj, 13—15jaraj, kunvenas ĉiun mardon vespere por lerni laŭ la Ĉ-metodo. Ili kunlaboras dum la konversacioj tiel bone, ke oni povas atendi bonan sukceson.

Nürnberg. La ĝisnuna distriktestro Gössmann emeritiĝis la 1an de januaro 1967 kaj transdonis pro tio sian oficon al s-ano Müller el Lichtenfels. Dum multaj jaroj s-ano Gössmann agadis modele kiel komisiito por Esperanto en la fervoja distrikto Nürnberg. Li organizis GEFA-jarkunvenon, diversajn regionajn renkontiĝojn, ekspoziciojn kaj kursojn. Eĉ informilo regule aperis. GEFA sincere dankas al li kaj deziras, ke laŭeble li daŭrigu sian kunlaboron por la esperantistoj de Nürnberg kaj GEFA.

Stuttgart. La 7an de oktobro komenciĝis nova kurso por komencantoj, kiun ok interesuloj partoprenas. — Komune kun la aliaj Esperanto-organizoj la fervojistoj la 10an de decembro festis la Zamenhof-solenon. La ĉeestan-

toj salutis la estro de la Esperanto-societo Stuttgart, s-ro Speckbacher. Pri la stato de la nuntempa laboro raportis s-ro Windisch, la senlaca organizanto de la laborokomunumo de Esperanto en Stuttgart. S-ano Kiefer, la distriktkomisiito por Esperanto en la Fervoja Social-organizo speciale informis kaj atentigis pri la IFEF-kongreso en Fulda kaj emfazis la partoprenon al tiu sam-kiel ankaŭ al la sekva kongreso de la Germana Esperanto-Asocio en Hamburg. Plue li informis pri la Esperanto-skisemajno en Krimml (Aŭstrio) Kulmino de la soleno estis prelego pri Hungario akompanita de kolorfilmo pri la UE-kongreso en Budapeŝto, kiujn prezentis s-ro Wagner, estro de la Naturamikaj Esperantistoj. La muzikan kadron prizorgis la „trio“ de la fervojista grupo. Post la serioza parto oni restis komune en gaja rondo. Kunvenoj estas ĉiun mardon en „Zeppelin“-gimnazio, Stuttgart, Neckarstraße, ĉambro 16 b.

Frankfurt. La grupo de la distrikto Frankfurt festis la 14an de decembro honore al Zamenhof. S-ano Höhn prelegis pri la elstara persono de Zamenhof, s-ano Barnickel montris du filmojn. Novajatoj pri la Esperanto-movado kaj la stato de IFEF-kongreso kompletigis la programon.

Diversaĵoj

Aŭstrio. La eŭropa Esperanto-kongreso 1967 okazos de la 23.—30. 7. 1967 en Innsbruck. Informoj: Aŭstria Esperantista Federacio, A 1150 Wien, Fünfhäusgasse 16

Germanio. En 1965 aperis 863 artikoloj pri Esperanto (laŭ raporto de la gazetara servo de GEA)

Izraelo. La ŝtatprezidanto, s-ro Zalman Ŝazar, estas honora protektanto de la 52a UEA-kongreso, kiu okazos en Tel Aviv de la 2a ĝis la 9a de aŭgusto 1967

Kalifornio. En Kalifornio estas konstruita granda domo, kies nomo estas Esperanto. Ĝi situas en la ĉefa ŝoseo de la urbo San Diego. En la domo troviĝas loko por 60 oficejoj.

Pollando. La Pola Esperanto-Asocio eldonis 16paĝan broŝuron pri la 2a Internacia esperantista ferio en Miedzygórze. La 3a aranĝo okazos en septembro 1967. La broŝuro estas ricevebla senpage de Pola Esperanto-Asocio, okcidenta regiono, Wrocław-17, P.K.8, str. Dubois 3, Pollando. 1 int. rpk por sendkostoj estas petata.

Nederlando. Inter la 19a ĝis 29a de aŭgusto 1967 okazos la Eŭropa Junulara Konferenco en Enkhuizen pri la temo „Miljara lukto kontraŭ la maro“ (problemoj kaj procedoj de moderna polderigo en Nederlando). Organizantoj: Nederlanda kaj Germana Esperanta Junularo. Kotizoj: 160 ned. guldenoj por la tuta konferencotempo. Aliĝo al: Nederlanda Esperanta Junularo, p/a s-ro Wim Jansen, Röntgenstraat 32a, Vlaardingen/Nederlando. Lindato por aliĝo: 15. 7. 1967.

Vorstand und Beauftragte der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn Sozialwerk

Stand: Januar 1967

Vorstand

Vorsitzender: BOI Gießner, Bf Elze (Han); Basa 949/852/31
Sekretärin: BOS'in Kruse, Sozialamt Frankfurt; Basa 955/5615
Schriftleiter: BOI Grass BD Wuppertal —T—Büro; Basa 946/468

Sonderbeauftragte

Kassierer: BAmtn i R Denk, Offenbach (Main), Landgrafenering 17
Sprachprüfungen: BOAmtn Dr. Lang, Prüfungsamt bei der BD Frankfurt; Basa 955/1501
Fachwörterangelegenheiten: BOI Ritterspach, Tarifamt Frankfurt; Basa 955/2239
Bücherei/BULTENO-Versand: BOBw Schiermann, Bf Elze (Han); Basa 949/852/25

Archiv: BS Barmaneter, Bf Woringen (Schwab); Basa 964/824/365
Jugendangelegenheiten: BS Doliwa, Bf Cordingen über Hannover; Basa 949/850/898/6122

Bezirksbeauftragte

Augsburg: BI Sturm, BA Kempten; Basa 964/844/202
Essen: BOAmtn Schnetzer, Bf Hamm (Westf); Basa 944/807/391
Frankfurt: BOAmtn Dr. Lang, Prüfungsamt bei der BD Frankfurt; Basa 955/1501
Hamburg: BOI Lepke, BD Hamburg —B—Büro —; Basa 947/5444
Hannover: BOS Heimlich, Bm Soltau (Han); Basa 949/850/127
Karlsruhe: BOI Hug, BD Karlsruhe —Ps—Büro —; Basa 953/5005

Kassel: BOS Tasler, BD Kassel —Ps—Büro —; Basa 957/2158
Köln: BOS Mester, Ga Rheydt Hbf; Basa 943/882/75/384/oder 106
Mainz: BAss Rittthaler, Bf Albsheim; Basa 954/865/53
München: BOBw Pollinger, BD München -HK —; Basa 962/1347
Münster: t BI Brandenburg, Bm Münster (Westf) 3; Basa 945/397
Nürnberg: BOS Müller, Bahnpolizei Lichtenfels, Basa 966/844/388
Regensburg: t BOI König, AW Weiden; Basa 965/829/622
Saarbrücken: BOS Hauptenthal, Ga Saarbrücken Hgbf; Basa 956/5558
Stuttgart: BOI Kiefer, BD Stuttgart —Ps—Büro —; Basa 952/5625
Wuppertal: BOI Graß, BD Wuppertal —T—Büro —; Basa 946/468



Nekrologo

Kun malgojo en la koro ni informas nian membraron pri la forpaso de nia amiko

**Gerhard Schneider,
fervoja prefekto,**

kiu mortis la 28an de novembro 1966 en la aĝo de nur 39 jaroj en malsanulejo.

Li fondis post la dua mondmilito la wuppertalan fervojistan Esperanto-organizon, kiun li estris modele ĝis la jaro 1955.

Abrupte kaj por ĉiam finiĝis multnombraj amikaj kontaktoj, kiujn ni havis kun li por la bono de nia komuna afero.

Germana Esperanta Fervoja Asocio
Estraro

Zeitschriftenumlauf

Die Zeitschriften werden nach ihren Herkunftsländern an die Esperanto-beauftragten der nachstehenden Bezirke verteilt, die sie etwa sechs Monate nach Erscheinen dem Archiv zuführen. Wir empfehlen unseren Mitgliedern, sich über die zahlreichen Ereignisse auf dem laufenden zu halten und die Esperanto-Zeitschriften bei den genannten Stellen anzufordern.

Hamburg: Belgien, Dänemark, England, Niederlande

Hannover: Frankreich, Jugoslawien, restliche Länder

Nürnberg: China, Finnland, Polen

Regensburg: Schweiz, Spanien, Übersee

Saarbrücken: Italien, Schweden, Ungarn

Wuppertal: Bulgarien, Österreich, Tschechoslowakei

Jahresbetrag

Unsere Vereinigung und vor allem IFEF sind auf Ihren Jahresbeitrag angewiesen. Bitte, überweisen Sie baldmöglichst 3,50 DM an Ihren zuständigen Bezirksbeauftragten.

Sprachprüfung

Anlässlich des IFEF-Kongresses in Fulda besteht wiederum die Möglichkeit zur Ablegung der Sprachprüfung nach den Richtlinien des Deutschen Esperanto Institutes. Wir empfehlen Mitgliedern und sonstigen Interessenten, sich schon jetzt auf diese Prüfung vorzubereiten. Anmeldungen nimmt entgegen: Dr. Wilhelm Lang, Prüfungsamt bei der BD Frankfurt/Main, Basa 955/1501.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen-Ohligs, Meteorstr. 13. Druck / presio: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervoja Asocio.